

## Mortis Gaston Waringhien

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1992 februaro 13

Cl.- Parolas Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Ĵus antaŭ kristnasko 1991-a mortis Gaston WARINGHIEN, kiu estis festinta la 29-an de julio sian naŭdekjariĝon. Pri tiu morto ni estis samtage informitaj de Perla MARTINELLI, la ĉefredaktorino de la revuo "Literatura Foiro". Ŝi haltis en La Chaux-de-Fonds revene el Parizo, kie ĝuste ŝi estis streĉe laborinta kun Gaston WARINGHIEN dum du tagoj cele al la korekto de manuskriptoj. Kiam ŝi revizitis lin por daŭrigi la laboron, la filino anoncis, ke interrompis tiun kunlaboron la morto. Dum la dormo mortis Gaston WARINGHIEN sen sufero. Lia koro ĉesis bati. Ĉu ne harmonia morto, kiel ĉio, kion ni li faris ?

A.- Povas esti, ke post unu aŭ du jarcentoj, kiam la lingvistoj kaj historiistoj raportos pri la heroaj pioniraj jaroj de esperanto, ili konsideros, ke Gaston Waringhien post Ludoviko Zamenhof, estas la homo, kiu plej multe influis la evoluon de la lingvo.

Cl.- Helpe de la 2-a numero 1991-a de la revuo "Itis-Forumo", kiu estis dediĉita al Gaston WARINGHIEN 90-jara, pere de artikolo de Roger BERNARD titolita "Biografia skizo pri Gaston Waringhien", ni povas iom detale raporti pri la vivo de la ĉefaŭtoro de Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, librego, kiun konsultadas ekde dudek jaroj ĉiuj seriozaj praktikantoj de la zamenhofa lingvo. Ni iom resume kaj per alia stilo citas tiun biografian skizon:

A.- Gaston Waringhien naskiĝis en Lille (norda Francio) la 29-an de julio 1901. Lia patro estis instruisto inter alie pri la germana lingvo.

Cl.- Deksep jara Gaston Waringhien estis varbita al esperanto fare de Gaston LEPHAY, la helpkasisto de la 1-a Universala Kongreso en Bulonjo-sur-Mar. "La vero trudas diri, komentarias Roger BERNARD, ke tio okazis pli ĝuste dankal la belaj okuloj de lia filino... Kio pruvas, ke, foje, tre "teraj" aŭ "eteraj" sentoj povas konduki al plej spiritaj altoj."

A.- Baldaŭ poste komenciĝis la eksterordinara kariero de Gaston Waringhien. 19-jara li estis jam licenciato pri literaturo; 20-jara li ricevis diplomon pri historio de la religioj; 22-jara li estis agregaciulo pri lingvistiko.

Cl.- Ne mirige do estas, se lia korespondado kun E. GROSJEAN- MAUPIN komenciĝis la 25-an de julio 1920. Li eĉ ne estis deknaujara. Li estis elektita, 24-jara, membro de la "Lingva Komitato". Profesie, en tiu tempo, li estas profesoro pri la latina, greka kaj franca lingvoj en la liceo de Lille.

A.- La devigan soldatservon li plenumas kiel rezerva infanterileŭtenanto.

Cl.- Apud la profesia kaj poresperanta laboro, li interalie fariĝas regula, ĉiusemajna literatura recenzisto por la radio-stacio de Lille. Li aliĝas en 1931 al la Socialista Partio kaj estas elektita en 1933 "Oratoro" en la framasona loĝio "La Homa Rajto". En 1936 li fariĝas departementa sekretario de la franca "Ligo por la Homaj Rajtoj".

A.- Intertempe en 1934 li fondas "Franca Esperanto-Instituton", kiun li prezidas ĝis 1963. Kaj en 1937 li estas elektita membro de la Akademio de la Lingva Komitato, la tiutempa nomo de la Esperanta Akademio.

Cl.- En 1939 lia profesia kariero kondukas lin al la Liceo de Tours. Sed tuj li estas mobilizita kiel stab-oficiro. La 27-an de junio 1940 li troviĝas inter militkaptitoj ĉe la Donon-monto en Alzaco. En sia "Oflag", tio estas oficir-restadejo en Germanio, li ekscias, ke pro sia aparteno al la framasona movado li estas demisiigita el la Universitato per dekreto de la franca ministro pri edukado. Tiam regis la Vichy-reĝimo submetita al la nazia reĝimo. Sed poste en 1942 tiu dekreto estis nuligita pro lia milit-kaptiteco.

A.- La 9-an de septembro 1942 li estas kondamnita de germana instanco pro "kaŝaŭskultado de anglaj radio-elsendoj" kaj sendita al la "Sonderlager" de Lübeck. Tiun urbon okupas britaj trupoj la 2-an de majo 1945 kaj tri semajnojn poste Gaston Waringhien estas elarmeigita en Tours.

Cl.- Kaj li povas nun daŭrigi sian esceptan karieron. En 1946 li estas membro de la nove reorganizita "Akademio de Esperanto. Politike li pravas la firmecon de sia karaktero: li rifuzas reaniĝi al la Socialista Partio kaj la Framasona Movado, ĉar li spertis, ke neniu el tiuj societoj dum la milito donis al siaj forkaptitaj membroj ian ajn ateston de solidareco, kontraste kun la same malpermesita esperanto-movado.

A.- Venas nun pli trankvilaj vivepizodoj. En 1947 li estas profesoro en la Universitato de Tours. En 1949 profesoro en la grava Liceo Lacanal en Parizo. En 1951 li partoprenas en la prilaboro de la lernolibro "**Français élémentaire**" por la ministra komisiono Gougenheim-Beveniste kaj en 1959 li kunlaboras en la verkado de la vortaro "**Grand Larousse Encyclopédique**".

Cl.- La esperantistoj scias pri lia vasta espartanta verkaro. Sed oni ankaŭ sciu, ke li tradukis ankaŭ el la angla francen ekzemple por la eldonejo Payot en Parizo la librojn de E. Langton **La Démonologie** kaj de F. Tomlin **Les grands philosophes de l'Orient** kaj de Will Durant **L'Age de la Foi**.

A.- En 1953 li estas fine liberigita de la militservaj devoj.

Cl.- En 1955 li estas kunfondinto kun R. Fiquet de la tre influa organo "**la nica literatura revuo**", kiujn li majstre redaktos ĝis 1962. Dume li estis profesoro ĉe la "Brita Instituto" en Parizo. Post grava okul-operacio li emeritiĝas kiel honor-profesoro en 1962. Ekde tiam li dediĉas sin plene al esperanto. De 1963 ĝis 1979 li prezidas la Akademion de Esperanto.

A.- Roger Bernard, la sekretario de la Akademio de Esperanto por la periodo 1964-1979 skribas, ke li senĉese havis kun Gaston Waringhien la plej amikajn rilatojn. Neniam estiĝis inter ili ombro de malakordo, tiom suverena estis lia mens- kaj labor-kapablo.

Cl.- Roger Bernard nombras, ke Gaston Waringhien partoprenis de 1928 en 24 Universalaj Kongresoj de UEA kaj en 9 Kongresoj de SAT. Kaj por tiuj, kiuj ŝatus ion sci pri lia familia vivo, li diras fine de sia biografia skizo, ke Gaston Waringhien estas vidvo kaj ke li havis tri infanojn, el kiuj unu plu vivas.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond omaĝis al Gaston Waringhien. Ĝis la reaŭdo!